

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Joachim Gießner*

1. La luno jam leviĝis,  
steletoj ekheliĝis,  
ravante homojn nin.  
Silentas la arbaro  
kaj super la kamparo  
nebulo pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,  
la mond' ne plu sin movas  
sub paca, klara lun'.

Nun petu noktan benon,  
de l'tago la ĉagrenon  
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo  
en brila ronda belo  
duon-videbla nur.<sup>2</sup>  
Ĉar multon ni ne vidas,  
ni ofte ĝin priridas,  
malsaĝe juĝas kun plezur'.

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Guido Holz*

1. La luno nun ekhelas,  
Steletoj oraj belas  
En la ĉiela klar';  
L'arbaro nigra revas,  
Kaj el herbejo levas  
Mirige sin nebula mar'.

2. Silenta estas mondo  
Kaj en krepuska rondo  
Hejmecas kun favor'!  
Similas kalman ĉelon,  
En kiu vi kverelon  
De l'tago dorme pelu for.

3. Ĉu vi la lunon konas?  
Aspekto nur duonas,  
Sed rondas ĝi en bel'.  
Do ankaŭ estas multo,  
Loganta al insulto,  
Okulojn ĝenas la malhel'.

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Otto Bonte*

1. La luno jam leviĝis,  
Steletoj ekheliĝis,  
Ravante homojn nin;  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo pala levas sin.

2. Ho, mondo la kvieta,  
Kaj kiel ŝajnas eta  
Krepuska en kovril';  
Por ke vi en ĉambreto  
Samkiel infaneto  
Senzorge dormu en lulil'.

3. Rigardu nun la lunon,  
Vi vidas nur duonon,  
Sed tamen ronda ĝi.  
Ni ofte ion ridas,  
Ĉar ni ne klare vidas,  
Ke ĉie regas harmoni'.

...

---

<sup>2</sup>S-ro Gießner unue tajpis:  
duona tamen nur.

4. .... ..... ..... ..... ..... .....	4. Ni homoj tiel vantaĵ Ja estas nur pekantaĵ, Malvasta nia sci’; Ĥimerojn ni eltrikas, Ni multe artifikas Kaj perdas celon pli kaj pli.	4. .... ..... ..... ..... ..... .....
5. .... ..... ..... ..... ..... .....	5. Vidigu, Dio, savon, Pasem’ ne veku raven, Ne ĝoju ni pro glor’! Fariĝu malafektaĵ Ni kaj al vi respektaj, Infane gaju nia kor’!	5. .... ..... ..... ..... ..... .....
6. .... ..... ..... ..... ..... .....	6. Vi gracu, sen ĉagreni El mondo nin forpreni Al fin’ per milda mort’! Kaj post forpren’ fidele Hejmigu nin ĉiele, Sinjoro, Dio, nia fort’!	6. .... ..... ..... ..... ..... .....
7. Ĉe l’fino de la tago kuŝigu vin sen plago, silentas la anim’. Ne punu nian faron, sed nin kaj la najbaron dormigu, Dio, nun sem tim’.	7. Kuŝigu do kun pio Vi en la nom’ de Dio, Jam fridas nokta vent’. Per punoj, Di’, ne ĝenu, Per dolĉa dorm’ nin benu, Najbaron ankaŭ en turment’.	7. Ekkuŝu nun, gefratoj, De bona Di’ ŝirmataj Kun tuta la homar’. Kar-Dio ne nin punu, Trankvilan dormon donu Kaj al malsana la najbar’!
...	...	...

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-394-782 (2007-03-28 09:55:34)*

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis tiun tradukon de Joachim Gießner el folio kun letero, kiun skribis al mi en 1987-11-24 s-ro Joachim Gießner. Li skribis en tiu letero, ke la fakto, ke lia traduko de la unua strofo estas tute la sama kiel en tiu de Otto Bonte, estas hazardo kaj ke li ne sciis antaŭe la tradukon de Otto Bonte.*

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).*

*Arg-394-778 (2007-03-26 12:53:22)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, sur paĝo 14 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Guido Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen.*

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de Otto Bonte.*

*Arg-394-779 (2007-03-26 22:31:58)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, sur paĝo 15 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Otto Bonte d-ro Dirk Willkommen, la tiama redaktisto de “Esperanto aktuell!”, .*